Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Familioj, 15 majo 2019

Ĉiujare, je la 15-a de majo, Unuiĝintaj Nacioj festas la Internacian Tagon de Familioj. Tiutage, Unuiĝintah Nacioj rekonas, ke la familio estas la baza unuo de socio. Pere de la familio, infanoj komencas sian edukon, lernas uzi lingvon, kaj lernas ankaŭ kiel interagi kun aliaj personoj. Poetoj, verkistoj kaj pensuloj tra la jaroj substrekis la gravecon de familioj. Kiam Zamenhof kreis Esperanton, li konceptis la lingvon kiel ligon kaj komunikilon kiu igu ĉiujn homojn en la mondo anoj de unu tutmonda familio.

Hodiaŭ multaj familioj estas dividitaj – de milito, de naturaj katastrofoj kaŭzitaj de klimatŝanĝiĝo, de malsato. Familianoj estas dismetitaj, kontraŭvole, tra la tuta mondo. Universala Esperanto-Asocio solidariĝas kun Unuiĝintaj Nacioj en ties subteno de la kondiĉoj en kiuj tiaj dividoj estu superitaj, kaj en kiuj dividitaj familioj povu reunuiĝi en paco, prospero kaj kompreno.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041